Universala Esperanto-Asocio

AKTIVULA MATURIGO
kma
Estrara Subteamo: MOVADO

EKO 2016-16 sendita el Budapeŝto la 20an de majo.

Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, la E-gazetaro kaj radiostacioj, listoj kaj unuopuloj (petu senpagan ricevon!).

# Seminarioj de AMO tra junio kaj julio

**La 25a seminario** okazos de la 28a de junio ĝis la 7a de julio en Raleigh, Usono (Norda Karolino) kadre de la ĉiujara somera kursaro NASK, kune kun la entenata KTF – la Kino-Teatro-Festivalo/

La seminaria temo estas 'Vigla Komunikado kun la Publiko'. Tio estos traktita en rilato kun, same kiel antaŭ unu jaro. Informoj pri NASK kaj KTF:

http://nask.esperanto-usa.org/venonta/

La **26a seminario** komenciĝos unu tagon poste , lige kun la 75a Hispana Kongreso de Esperanto en Herrera del Duque (Ekstramaduro). Ĝi okazos tra tri tagoj (junio 29, 30 – julio 1). Gvidontoj estas Sara Spanò, J.A. de Barrio, J.M. Salguero, Miguel Fernández, Miguel Gutiérrez Aduriz, Irek Bobrzak, Ana Manero. István Ertl, E. Berdor kaj Pablo Busto. Informoj pri la kongreso:

http://www.esperanto.es/hef/index.php/kongreso

La **27a seminario** realiĝos kadre de la 72a Internacia Junulara Kongreso en Vroclavo, Pollando kiu okazos inter la 16a kaj la 23a de julio (http://ijk2016.tejo.org/). La komencaj tagoj dediĉiĝos al la dua parto de la profesinivela trejnado, kies unua parto okazis en IJF en Pesaro, Italio, fine de marto 2016. Tiu trejnado okazos por fiksita grupo en la angla lingvo. En la lastaj tagoj la kursfinintoj devos tuj en Esperanto gvidi sesiojn por tiuj partoprenantoj de la IJK, kiuj deziras sperti tion.

La 27a en la 72a! Kia koincido!

La AMO-programo estis prezentita de la nova prizorganto dum la 93a Germana Kongreso de Esperanto en Munkeno en la pentekosta semajnfino.

ijk
#AKTIVADO
VROCLAVO 2016
72-A INTERNACIA JUNULARA KONGRESO DE TEJO

# INSTRUISTA TREJNADO – unika unujara eblo!

La Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz (Poznano, Pollando) kaj ILEI denove kune organizas unujaran instruistan trejnadon, kiu disponigas la bazajn konojn necesajn por instruado de esperanto kaj trejnos la partoprenantojn pri metodiko.

La kursaro necesigas partoprenon dufoje en la surloka intensa semajna sesio (17-23.sept. 2016 kaj 04-10 feb. 2017) kaj intertempan hejman laboradon, retajn taskojn kaj konsultiĝon kun la kursgvidantoj kaj fine pretigon kaj prezenton de laboraĵo pri metodika temo kun la fina ekzameno en septembro 2017. Kursfinintoj ricevos ILEI-diplomon pri instruista trejnado.

Kondiĉoj: bona lingvoscio (min. B2, atestilo pri Esperanto-ekzameno estas bonvena) kaj baza kono de esperanta kulturo, krome finita mezgrada lernado (tipo de abiturienta ekzameno).

Partoprenkotizo: A-landoj: € 300 EUR, B-landoj € 130 EUR por unu semestro. Ebloj por stipendioj sub prilaboro. Informo kaj aliĝo: interlin@amu.edu.pl aŭ ikoutny@amu.edu.pl.
Retejo: http://www.amu.edu.pl/~interl/

Foto: La metodika grupo el la antaŭa studperiodo



## El la Programo

**Lingvopedagogio** (Katalin Kováts, Zsófia Kóródy, Duncan Charters, Ilona Koutny): instrumetodoj kaj procezoj, evoluigo de kapabloj, taksado, lingva interfero, ktp.)

**Esperanta metodiko**: instruado de elparolo, gramatiko, vortoprovizo kaj kulturo, lecionplanado, Instruhelpiloj (de instruista kofro tra eldonaĵoj, filmoj ĝis retkursoj

**Esperanta kulturo** (Tomasz Chmielik, István Ertl, Aleksander Korĵenkov, Ilona Koutny): Historiaj eventoj, periodoj kaj verkistoj de E-literaturo, Tiklaj punktoj de E-gramatiko

**Plusoj:** partopreno de pliaj eminentuloj, i.a. Renato Corsetti pri la E-movado, Probal Dasgupta pri literaturo…

En sekva komuniko ni montros, kiom atingebla (kilometre, elspeze) estas Poznano!

# Okazis la unua semado – sekvos la dua



Okazis la unua aljuĝo de la nova programo de UEA 'Ni semas'. La celo de tiu programo estas kuraĝigi etajn projektojn kiuj leviĝas en ajna parto de la komunumo, ne nepre el la kutimaj asociaj strukturoj. La dono de cent euroj okazis por projekto en la oriento de DR Kongo.

La aljuĝo okazas por financi skrib- kaj lern-materialojn por lernantoj en mezlernejo por orfoj kaj infanoj en malfacilaj situacioj. Celoj estas konigi la lingvon tra la regiono kaj peri konsilojn pri civitaneco kaj pacema kunvivado.

La programo 'Ni semas' havas retpaĝojn, ene de retejo, kiu restas sub konstruo. En la supra horizontala menuo vi trovos la temon 'Ni semas'. Jen la adreso: http://aktivulo.net.mastertest.ru/eo/ni-semas. Tie vi vidas en la maldekstra vertikala menuo tri subtemojn: **Klarigoj, Regularo** kaj **Petiloj**

## Klarigoj

En tiu parto vi legos simplan tekston, kun naŭ bone strukturitaj alineetoj, kiuj klarigas la celon kaj funkciadon de la projekto. Tempo-investo por legi: 3 minutoj. La teksto estas plie elŝutebla en formatoj PDF kaj *Word*.

Saltu rekte al tiu paĝo: **http://aktivulo.net.mastertest.ru/eo/ni-semas**

## Regularo

En tiu parto vi legos simplan regularan tekston, kun kvin bone strukturitaj alineetoj, kiuj difinas la funkciadon de la projekto. Temas pri regularo starigita de la Estraro de UEA. Tempo-investo por legi: 3 minutoj. La teksto estas plie elŝutebla en formatoj PDF kaj *Word*.

Saltu rekte al tiu paĝo: **http://aktivulo.net.mastertest.ru/ni-semas/regularo**

## Petiloj

Tie vi trovos la petilon mem, kiun vi piovos elŝuti en formato PDF aŭ dokumento Word. Sub tio estas gvidilo pri la manieroj plenskribi PDF-formularon – eĉ per nur PDF-legila programo. Tiu gvidilo estas elŝutebla ĉu en formato PDF, ĉu kiel *Word*.

Saltu rekte al tiu paĝo: **http://aktivulo.net.mastertest.ru/ni-semas/petiloj**

La sekva konkurso finiĝos la **30an de junio** – proponoj estas bonvenaj al la donita retadreso:

nisemas<ĉe>co.uea.org

Tiu adreso atingas la kvar konsilianojn, kiuj prijuĝos la petojn.

Vortoj: 750

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Por vidi pli malnovajn komunikojn iru al: www.uea.org/vikio/Komunikado_kun_LA,_FA...